

Religio kaj kapitalismo

*La homoj pensas laŭ siaj imagoj,
ne laŭ la prudento.*

Spinoza.

Ni konscias, ke ni, traktante supran temon, tuŝas la plej gravan problemon de la filozofio, nome, la rilatoj inter materio kaj spirito, por kio fakte la lingvo estas tro mankhava. Ni devas kontentigi nin per la supraĵaj simboloj, materio kaj spirito, per kiuj ni provas krei koncepton pri la konkreta kaj la abstrakta homo.

Ĝis nun neniu pensulo sukcesis precize difini, kiel kaj kiagrade materia procezo influas aŭ difinas ian spiritan procezon, kiel la homo per la sperto de la sensoj en la spirito formas noción, ideon, koncepton aŭ laŭ la kombino de la nederlanda lingvo iun pensbilden. Certe estas, ke nia spirito ne funkcias kiel foto-aparato, ĝi ne estas antaŭ la materiaj spertoj en la ekstera mondo aŭ post iu stimula impresoj el la ekstera mondo malluma kamero, armita per tre facile impresebla fotopapero.

Ni devas apliki la ideon "religio" en la plej vasta senco: klopodo de la homo per imagita mondo superi la doloron de la vivo, superi siajn sentojn de timo kaj de dependeco al grandaj misteraj potencoj, ĉu de la naturo, ĉu de la socio, klopodo de la homo trovi meze de ĥaosa amaso da fenomenoj komprenon kaj vivo-certojn kun morala apogilo por lia lukto por natura kaj socia ekzisto.

Rilate la "kapitalismon" ni celas koncepti ĝin per ĝiaj komunaj formoj kaj karakterizaj trajtoj: produktsistemo uzanta la monon kiel interŝanĝilon por havigi varojn, aplikanta la sistemon de kredito kaj rento, kontraŭe al naturekonomio, kiu aplikas interŝanĝon de varoj kontraŭ varoj kaj kie okazas pago de ŝuldoj per servoj aŭ per naturaj produktoj.

Tio, kion ni provos priskribi, estas verdire

socia dramo, dramo de detruo de socio kun stabileco kaj ekvilibreco, kiu kontentigis la plej unuajn la plej urĝajn bezonojn, kies anoj atingis certan socian kontenton ne postulante pli, kies anoj ne senripoze ĉasis al mono, al profitoj koste de la najbaroj kaj kies spiritaj kaj kulturaj deziroj estis kontentigataj de unu religio, de unu eklezio, la Rom-Katolika.

Tiun tempon oni ĝenerale nomas La Mez-Epokoj kaj tute senpense ni uzas la historian kategorion de la lernolibroj: Mez-Epokoj 500-1500. Ni ankaŭ provas karakterizi la mez-epokan socion kiel feŭdan socion, sed la feŭdismo per jarcentoj supervivis la detruon de la mez-epoka socio. Sed la etiketoj mez-epoka kaj feŭdisma tute ne sufiĉas por kontentige priskribi kaj imagi la tiaman socian realon. Kiam ni provas skizi la socian dramon, la detruo de grandparte stabila kaj ekvilibra socio pro la frukapitalismo, kiu trapenetris la socion kvazaŭ malica serpento kaj fine subfosis la firman strukturon, ni konsciu, ke tio okazis malsame kaj ne samtempe tra tuta Eŭropo. Ĉio dependis de naturaj kaj klimataj kondiĉoj kaj stato, ĉu oni loĝis en la germanaj arbaroj, sur la plataj germanaj kampoj aŭ en la marĉoj de la Nederlando, ĉu apud rivero aŭ apud la maro. Certe la socio pli funde kaj pli rapide evoluis en la du lastaj kazoj, ĉar la fluanta akvo vere invitis al moviĝo, al komerco. Unu vorto, la Mez-Epokoj, validaj por ĉiuj landoj kaj regionoj ne sufiĉas. La anglaj mez-epokoj tute kontrastas kun la italaj kaj sud-germanaj mez-epokoj, la francaj tute diferencas kun flandraj mez-epokoj. Sed ili havas komunajn trajtojn, grandajn ŝanĝojn, sociajn skuojn kaj tensiojn ili ne spertis. Neniu socio estas tute sen ŝanĝoj, la pli junaj generacioj ĉiam kaj ĉie deziras ion alian, ankaŭ en la mez-epoka socio. Malgraŭ la malalta ne kontentiga vivnivelo okazis teknikaj inventoj: la akvomuelilo, akvosegilo, sablotempmezurilo, ĉevalbridoj, kanalkluzoj, ŝpinnavedo, teksilo.

Statika Socio

Estas malfacile por ni, vivantaj en dinamika socio kun tensio, konfliktoj, strikoj, korupto, imagi la vivon en la statika socio de la feŭdismo. La sistemo de la feŭdismo estis bazita sur strikta hierarkio de sociaj klasoj de malsama socia deveno. Ĝi ne estis sistemo de produktado, ĉar en la Mez-Epokoj la ideo de produktado estis tute fremda, oni simple kontentigis bezonojn, sed la feŭdismo estis sistemo de regado. La diversaj klasoj konstruis iun inter-ekvilibrecon, ĉar ili urĝe bezonis unu la alian. La nobelo ne povis vivi sen siaj servutuloj aŭ servutaj kamparanoj, kaj tiuj, malaltaj socianoj ne sen la protekto de la sinjoroj. La grafo, duko aŭ reĝo estis senpotenca sen siaj vasaloj kaj tiuj siavice dependis de la altuloj per la pruntsistemo de grundoj. Ĉiu akceptis tiun ordon, kiu garantiis certan sekuron kaj protekton. Ĉu ne en la biblio troviĝas, ke la malfortaj devas esti protektataj? La Rom-Katolika Eklezio tre facile povis proklami tiun ordon kiel la ordon de dio. Tre komprenebla estis la tiama spirita potenco de la eklezio. La vilaĝanoj, sklavo, servutuloj, kamparanoj, etmastroj vivis en strikta, fermita komuno, kiun ili praktike neniam forlasis kaj kies limoj estas klare videblaj. La centra aŭtoritato estis en iu urbeto, tre fora, sed la monaĥejo aŭ la preĝejo estis tre proksima por helpi kaze de malsano de homoj aŭ de plantoj, ĉar la grandaj malamikoj en la Mez-Epokoj estis malsano kaj malsato. Krome la afablaj monaĥoj aŭ pastroj posedis la misteran potencon kompreni ion el tiuj enigmaj figuroj en la libroj.

La eklezio por ili ne estis iu timiga potenco, por ili ĝi estis espero kaj protekta potenco, por ili ĝi estis la socio mem. La mez-epokaj loĝantoj havis praktike unu zorgon, ne ĝeni aŭ renversi la socian stabilecon, ankaŭ en la postaj urboj la gildanoj fiksis prezojn kaj salajrojn por ke neniu malhoneste riĉigu sin koste de pli dependaj najbaroj.

La tiama Kristanismo pravigis la regantojn kaj konsolis la subprematojn. Karlo la Granda vidis, ke la socio ne restos stabila sen la eklezio kun spirita kaj kultura potenco, li fondis ian



Max Weber

teokratian reĝismon, li daŭre fondis intimajn rilatojn kun la eklezio. La bazo de la feŭdismo estis agrikultura naturekonomio. Post la veno kaj kresko de la urboj la feŭdaj regantoj komencis perdi terenon kaj kiam post la Reformacio ankoraŭ restis socioj kun feŭdaj rilatoj, tiam tio nur povis okazi en landoj kaj regionoj, kiuj plejparte vivis per agrikultura ekonomio. Se unu el la trajtoj de naturekonomio estas interŝanĝo de varoj sen la uzado de mono, tiam en la fruaj urboj kaj urbetoj naturekonomio ankoraŭ longtempe restis. Kamparanoj, kiuj bezonis ŝuojn, ekzemple pagis per ovoj aŭ viando aŭ per lano, dum ili mem liveris la ledon, aŭ en la urboj ankoraŭ estis kamparanoj, kiuj loĝis tie kaj liveris viandon kaj legomojn.

Sed la mez-epoka ekonomio ne kontentigis ĉiun unuan bezonon. En rondoj de nobeloj kaj sinjoroj oni sopiris al aromaj parfumoj por superi la naŭzan fetoron, odoraĉon, kiu plenigis la aeron de iliaj korpoj, ĉar lavi kaj nudigi la korpon estis io hontinda. En

monaĥejoj tio tute estis malpermesata, oni ne rajtis vidi sin kia oni naskiĝis. Precipe la nobelinoj sopiris al la arabaj parfumoj, al kiuj ankaŭ sopiris lordino Makbeth. (Ĉiuj aromoj de Arabio ne faros tiun malgrandan manon bonodora). Alia urĝa bezono estis tiu de ia insektopudro, ia d.d.t., por sukcese kontraŭbatali la armeojn da pedikoj kaj puloj, kiuj nutris sin sur la neniam nudigitaj korpoj, sed provizore la komercistoj ne ofertis ion tian kaj la gesinjoroj devis uzi la fingrojn. Kaj ne nur ili, sed la tuta popolo. Mi preskaŭ forgesis mencii alian mankon, kiujn la tiamaj homoj forte sentis. La nutraĵoj forgesis karesi la palaton, oni sopiris al gustvekaj, al buŝpikaj rimedoj kaj tiun bezonon la komercistoj povis kontentigi, sed ne de ĉiu; la spicoj venis de foraj regionoj. Kaj tiuj benoj estis nur aĉetebblaj per mono, ĉar la komercisto ne povis transporti naturajn produktojn. Per aliaj ofertaĵoj li vekis la deziron pri lukso, ideo tute ne konforma al mez-epoka socio. Li ankaŭ alportis ion abstraktan, konon kaj scion pri aliaj landoj. Tiel tiu polkvovrita vojaĝisto kun siaj ŝarĝitaj muloj estis la heroldo de detruo de tradicia, stabila socia kaj spirita mondo de la feŭdismo.

La Kerno de la Kristanismo

”Se ne ĉiu ricevas la sian kaj kiam do justu estas flankenŝovita, la riĉuloj de ĉi tiu mondo estas nenio ol grandaj rabistbandoj kaj la rabistbandoj estas nenio ol etaj regnoj, kiuj pro aniĝo de senesperaj homoj povas diskreski al grandaj regnoj. Tia rabistbando alprenas post la konkero la nomon ”regno”, nomo, kiu ne havigas al ĝi la absolutan pardonon, sed tamen senpunecon”.

Supraj indignaj, tondraj vortoj ne estis dirataj de Marks aŭ Lenin, sed de la kristana patriarĥo Aŭgustino ĉirkaŭ 400 post Kristo. Aŭgustino vidis la formiĝon de la politika, ekstereklezia ŝtato kaj konsideris ĝin potencaparato, kiu sklavigas la homojn sur la tera regno kaj li metis kontraŭ tiu ŝtato la dian regnon.

La origina Kristanismo havis revolucion kieron, ĝi inter aliaj predikis la egalecon de la

homoj antaŭ dio. Frederiko Engels kaj Lenin trovis tiun kernon. La unua skribis: ”La Kristanismo posedas revolucionan elementon, la unuaj komunoj estis batalpretaj”. Lenin skribis: ”La kristanoj de la 4-a jarcento havis demokratrevolucion spiriton, sed kiam la kristanismo iĝis ŝtatreĝio, ĝi perdis tiun spiriton”. Poste en la historio kelkfoje tiu revolucio kaj ribelemo revekigis, ekzemple ĉe militrifuzantoj, kiuj apogas sin sur Kristo kaj la Biblio. En la granda kamparanmilito de Germanio en 1525 la ribelaj kamparanoj postulis de la eklezio la fondon de la dia regno surtere. Sur iliaj standardoj troviĝis: ”Nur la justu de dio”, kaj kiam la eklezio ne realigis iliajn dezirojn la kamparanoj venĝis sin sur la pastroj en terura kaj besta maniero. Tiuj iĝis la veraj viktimoj. Per la dia regno la kamparanoj ankaŭ konceptis la dividon de ekleziaj grundoj.

La vortoj de Aŭgustino ankaŭ detruis la falsan bildon pri la Mez-Epokoj, kiun oni ĝenerale havas, bildon de trankvila kaj paca kunlaborado. Sed Aŭgustino vivis en la frua komenco de la Mez-Epokoj, kiam la disfalo de la Roma Imperio detruis fonditajn rilatojn kaj sociajn organizojn. Daŭris jarcentojn, antaŭ ol restariĝis certa socia ordo kaj aŭtoritato, kiuj devis solvi la problemon de malsato kaj socia fiaoso. La Rom-katolika Eklezio ludis gravan rolon en tiu procezo, kelkaj papoj organizis multe por helpi dependajn homojn. Tio estis unu fakto, kiu instigis la amasojn ani kaj akcepti la kristanismon.

Por akiri la subtenon de eksterekleziaj potenculoj, de neekleziaj ŝtatoj, la eklezio devis cedi sian originan radikalan revolucion starpunkton de la egalo de ĉiuj homoj. Ĝi povis pravigi la defendon de la skaveco pere de la apostolo Paŭlo, kiu skribis en Efesoj 6:5: ”Sklavoj obeu al tiuj, kiuj laŭ la karno estas viaj sinjoroj kun timo kaj tremo, en simpleco de via koro kiel al Kristo”. Ankoraŭ la sankta Tomaso (1225-1274) skribis: ”Sklaveco estas inter la homoj io natura. La sklavo estas instrumento de la mano de sia sinjoro. La sinjoro havas la rajton puni sian sklavon”. Rilate tiun cedon Marks kaj Engels akre riproĉis la kristanismon entute: ”La kristanismo adoris en la Mez-Epokoj la servutecon kaj

sklavecon kaj eĉ povas pravigi la subpremadon al la proletaro. La sociaj principoj de la kristanismo predikas la neceson de reganta kaj subpremata klaso, maljusto estas puno por la heredo-peko aŭ elprovo de la sinjoro, alŝarĝita pro lia senfina saĝo”.

La mez-epoka socio dum Karlo la Granda estis agrikultura socio kaj ĝenerale oni donas du kialojn por tio, unue, la manko de nutro kaj la fakto, ke oni estis devigita al agrikultura socio sen komerco pro la fakto, ke la Araboj firme ĉirkaŭis Okcident-Eŭropon kaj malebligis tiele la komercon. La belga historiisto Pirenne esprimis tiun staton tiel: Karlo ne povis flosigi unu breton surmare. Tiu lasta argumento ne tute pravas. En la araba cirklo estis truo, nome en la nordo de la Nederlando kaj Nord-Germanio. La Frisoj povis ŝipveturi al Anglio kaj Danio. Ili estis pro naturaj cirkonstancoj brutarbredistoj kaj brutarkomercistoj. Ili havis moveblan posedon, ili certe sentis la bezonon komercante pri praktika interŝanĝilo. Komence verŝajne ili uzis brutaron kiel pagilon. La germana vorto "Vieh" (prononcu fi) por brutaro sonas same kiel la angla vorto "fee" (prononcu fi), kiu signifas ankoraŭ "salajro, honorario". En la nederlanda lingvo ekzistas la vorto "fooi" (prononcu foj), kiu signifas "trinkmono".

La Mez-Epoka Socio

La soci-ekonomia vivo en la fruaj Mez-Epokoj ĉirkaŭ 800 okazis en malgrandaj, sendependaj komunumoj, kiuj grandparte provizis sin mem. Ili neniam estis vizitataj de komercisto. Tiaj komunumoj povis esti granda farmejo aŭ sinjorejo kaj jam en tiu strikta socia spaco povis okazi specialigo de laboro. Servutaj kamparanoj pli emis konstrui domojn aŭ fari aŭ ripari laborilojn. Se oni bezonis ion, kio ne troviĝis en la farmejo, oni havis monfarejon, en kiu oni batis moneron el certa metalo. Dum Karlo la Granda vere estiĝis miniaturcivitaj, miniaturŝtatoj, miniatursocioj. Sed iu historia faktoro komencis ŝanĝi kaj kreskigi ilin, faktoro ĝenerale neglektata kiel kaŭzo de progreso kaj de pli da libero. La loĝantaro de Eŭropo

komencis kreski, procezo, kiu daŭris ĝis ĉirkaŭ 1350. Ĉirkaŭ la farmejo aŭ sinjorejo formiĝis vilaĝo, kiu pli grandiĝis al urbeto kun ankoraŭ elementoj de agrikulturo en si. Post la veno de komercistoj post ĉirkaŭ 1000 al la vilaĝo kreskis ia antaŭvilaĝo aŭ al la urbeto ia antaŭurbo, kie la komercistoj loĝis, multaj provizore, ĉar la plimulto provizore restis nomadaj, aŭ ili loĝis tie konstante. Tiajn antaŭurbojn oni nomis "burgo", vorto ankoraŭ trovebla en la nomoj de multaj urboj. Ĉirkaŭ 1200 la vilaĝoj estis tute perdintaj sian mez-epokan karakteron. Kelkaj komercistoj loĝiĝis sin kiel monpruntistoj kaj se tia homo estis la nura en la vilaĝo, li estis malamata monopolisto, kiun oni malfacile povis kontroli rilate uzuron. Kamparanoj, kiuj spertis misrikolton aŭ malsanon inter la brutaro bezonis krediton por aĉeti grenerojn aŭ novajn bovinojn, manlaboranto, kiu perdis sian monon bezonis materialon. Sed la mez-epoka karaktero iom restis. Oni pruntprenis monon laŭ strikta neceso kaj laŭ la dimensio de la vilaĝo, tio signifis: por tuja konsumado kaj por tuja uzado, ne por iu surpluso. En la pli grandaj urboj ofte iu pogrاندkomercisto finance havis la tutan urbon en katenoj malgraŭ la avertoj de la pastroj: uzuro estas pli malbeninda ol aliaj pekoj. Provizore ankaŭ la mez-epoka paco kaj stabileco restis en la vilaĝo aŭ urbeto. Salajro kaj alia pagado ne estis brula demando, la ekonomia kaj socia dimensio ankoraŭ estis tro etskala. Sed kie la grandaj industrioj kreskis en Flandrio kaj Italio, la paco estis for. Tie okazis ribeloj kaj strikoj de teksistoj, kiuj nur posedis siajn vestojn.

La kresko de la loĝantaro ankaŭ kaŭzis superfluron de servutuloj en multaj farmejoj, sinjorejoj kaj vilaĝoj kaj ili povis iri al la plej proksima urbo, kie ili ĝenerale faris manlaboron, iĝis etmastroj, forĝistoj, ĉarpentistoj, bakistoj, ktp. Nun la eksservutulo devas labori por mono kaj pagi mem por ĉio: nutro, domo, vestoj, enterigo, li nun estas libera, sed certe lia vivo ne estis iĝinta pli facila. Multaj ne sukcesis kaj forte bedaŭris esti forlasintaj la senzorgan vivon de la kamparo, multaj savis la vivon per almozpetado aŭ per ŝtelado kaj finis sian vivon sur la pendigilo. Tiuj novaj

etmastroj, tiuj etindustrioj estis la heroldoj de la posta grandindustria socio. Eĉ en kelkaj grandaj urboj ne okazis evoluo al grandindustrio. Parizo en la fino de la 13-a jarcento havis 128 gildojn, kies membraro konsistis el 5000 etmastroj, kiuj laborigis 6000 aŭ 7000 dungitojn. Frankfurto havis en la sama tempo 1554 etmastroj kun 700 aŭ 800 dungitoj.

La homoj en la fruaj mez-epokaj ekonomiaj kaj sociaj organizoj estis devigataj al kunlaborado. Ankaŭ poste en la urboj la homoj laboris korporacie, individuismen oni cedis aŭ subpremis, oni agis kaj pensis korporacie, kvankam la sociaj unuoj kaj rangoj estis apartigitaj: gildoj, patricioj, komercistoj, eklezianoj. La urbo kun sia bezono pri mono kaj kun sia moncirkulado estis en la stabila feŭdismo iu ĝena kaj revolucia faktoro, kiu komencis pli kaj pli detruigi la simplan natur-ekonomion de la feŭdismo. La laboro kaj servado pagata per mono skuis la iam naturajn rilatojn inter homoj kaj kreis alian moralon.

Sed la urbo kontribuis al la liberiĝo de servutuloj kaj al la liberiĝo de la servutaj kamparanoj. Por liveritaj produktoj al la urbo la kamparano ricevis monon, per kiu mono li povis pagi la farmprezon al la sinjoro, kiu ankaŭ komencis bezoni monon por pagi la komercistojn. Kiam li poste bezonis pli kaj pli da mono, la kamparano per surpluso da mono fine povis liberigi sin de la dependeco de la sinjoro. Fine la monekonomio renversis rilatojn kaj valorojn de la Mez-Epokoj. Burĝoj iĝis pli riĉaj ol reĝoj kaj imperiestroj kaj kvankam ili politike oficiale ne estis agnoskitaj, per sia mono ili povis aĉeti kaj vendi kronojn.

La Nova Dio

La evoluo de komerco kaj industrio kondukis al grandaj diferencoj inter la diversaj landoj kaj regionoj. Ni jam markis la eblan evoluon de socio kun mono de post 1200 kaj en la 15-a jarcento Flandrio estis centro de kapitalista teksindustrio, Sud-Germanio grava kapitalista komerca kaj industria centro, Florenco centro de kapitalista financado kaj ankaŭ la papa kortego ne tenis sin pura de

praktikoj tute kontraŭ la ideoj de Kristo. En la sama tempo Anglio havis "mez-epokan" pastoralan, arkadian ekziston kun ankoraŭ simplaj, naivaj konceptoj, sen kapitalista havemo, eksportante kelkajn krudmaterialojn kaj iom da nutro. Laŭ profesoro Tawney la diferenco estis tion granda, kiom inter la nuna Londono kaj la nuna Danio.

Oni sur la kontinento daŭre modifis sociajn teoriojn pri prezoj, profitoj kaj uzuro, formulitaj en religiaj doktrinoj, pli komplekse kaj realiste dum la 15-a jarcento ol dum la 13-a. Dum la 15-a jarcento okazis kaj kreskis granda komerca aktivado kaj ekonomia spekulado, kiuj kondukis al grandaj eksplodoj en la 16-a jarcento. Malgraŭ la religiaj doktrinoj, kiuj devis reguligi la praktikojn de la monekonomio, la eklezio kaj la papa kortego agis tute kapitaliste. La teniĝo de la eklezio dum tiu ekonomia evoluo estis hipokrita kaj duoblekora. Oni oficiale kritikis lupan ekonomian apetiton, oni avertis kontraŭ devioj de la severaj oficialaj reguloj, oni promesis malbenon por riĉiĝoj, admonante kaj memorigante pri la simpla, asketa vivo de la unuaj kristanoj. La eklezio lasis sin instigi al partopreno en la krucvojaĝoj de la kapitalista respubliko Venecio, kies celo estis detruigi sian kristanan konkuranton Bizantiumon, la bastionon de la kristanismo kontraŭ la Turkoj. Dante, la poeto, image jetis monpruntistojn en la inferon, sed papo nomis ilin "specialaj filoj de la Roma Eklezio". Iu angla episkopo de Londono elpelis lombardajn bankistojn, sed papa protekto reinstalis ilin. Ekde la mezo de la 13-a jarcento kontinue plendkrioj levigis kontraŭ la malico de la eklezio, kunpremitaj en la vorto "uzuro". La papa kortego estis la plej granda financa institucio de la Mez-Epokoj kaj ĝia trezorsistemo fuŝis bonajn rilatojn. Misuzoj, kiuj estis akveroj en la 13-a jarcento estis torento en la 15-a. Kaj Romo ne staris sola en tiaj praktikoj. Pastroj ĉie okupis sin per komerco kaj eldevigis uzurajn sumojn. Kolegioj de katedraloj pruntdonis monon laŭ altaj rentumoj. Iu episkopo de Parizo, kiun konsultis iu uzuristo rilate la savon de sia animo, rekomendis dediĉi sian akiritan riĉon al la konstruado de Notre Dame. La Sankta

Bernardo diris: "La eklezio vestas siajn ŝtonojn per oro kaj lasas siajn filojn nudaj". Oni rajtas demandi, ĉu ne levigis protestoj kontraŭ tiaj praktikoj. La protestoj okazis per formado de sektoj, kiuj alprenis denove la vivmanierojn de la unuaj kristanoj, simplaj kaj asketaj, tute fidelaj al la vivo de Kristo. Tomaso de Akvino, itala dominikano (1225-1274), diris: "Peki estas trompe vendi ion por pli alta prezo". Multaj episkopoj cerbumis pri la ĝusta prezo, religio kaj ekonomio estis intime interplektitaj. En la Nordaj Nederlandoj, en la aktiva komercurbo Deventer formiĝis la sekto *Fratoj de la Komuna Vivo*. Tie Tomaso de Kempen verkis sian libron: *Imito de Kristo*; nederlanda mistikulo. Ankaŭ Erasmo poste ricevis instruadon en la sama urbo. Tiaj sektoj montris la elementojn de pura religio: asketismo, sinoferemo, kiujn trajtojn oni ankaŭ trovas en la naciismo.

La mono iĝis la nova dio, la nova fetiĉo, kreskis nova ekonomia apetito havi pli da mono ol necese, ĉar per la mono oni havas potencon eĉ super nobeloj kaj sinjoroj. La sistemo de kredito kaj rento kaŭzis la ekonomian fenomenon, ke mono produktas monon, io, kion Aristotelo absolute refutis: Mono neniam produktos monon, sed en Eŭropo post 1200 tio okazis. Ĉirkaŭ 1500 la eŭropa socio estis tiom ŝanĝita kaj la naturaj rilatoj preskribitaj de la religio tiom detruitaj, ke la ĝenerala konvinko estiĝis, ke la malnovaj doktrinoj kaj teorioj, kiuj preskribis la malnovan moralon kontraŭ riĉiĝo kaj uzuro, ridinde kontrastis kontraŭ la socia praktiko. Ĉio vokis al abolo aŭ radikala ŝanĝo. Pli da libero en la socia kaj ekonomia vivo vekis deziron al pli da libero en la religio kaj en la eklezio. La Reformacio vere estis socia konflikto findisputita en religiaj formuloj.

Marks kaj la Religio

Kiam Karlo Marks estis juna studento en Bonn, 17-jara, li legis Spinozan kaj unu alineo forte trafis lin, kion Spinoza skribis pri religiemo. "Religiemo ofte trovas sian kaŭzon en la mizero de la homoj kaj tial estas konscie favorata de politikaj regantoj por teni la

regatojn trankvilaj". Tiutempe tre rimarkinda rimarko kaj depost tiu lego Marks provis trovi certajn rilatojn inter religio kaj politika subpremado. Eble tiu alineo instigis Marks poste formuli sian teorion pri la rilatoj inter la socio kaj la ideoj de la homo.

En 1843 li, 25-jara, verkis *Kristiko pri la Hegelana Jurfilozofio*. En ĝi li speciale atentis kaj traktis la problemon de la religio, pli vaste ol Spinoza, armite per pli da socia kaj politika kono ol Spinoza. Oni rajtas konsideri tiun verkon kursalto al la posta formulado de la tielnomata historia materiismo, vorto, kiun Marks neniam uzis. Lia amiko Engels donis la nomon. La ideo de Marks estis, ke socia, materia mizero kreas imagojn en la homa spirito, per kiuj la homo image provas superi la materian mizeron, la vivdoloron kaj per imagita mondo feliĉigi sin aŭ atendi rekompencan en la postmorta imagita mondo. "La homo kreas la religion, la religio ne kreas la homon. La homo ne estas abstrakta ekster la mondo vivanta estulo. La homo, tio estas la mondo de la homoj, la ŝtato, la socio. Ĉi tiu ŝtato, ĉi tiu socio produktas la religion, iun eraran mondkoncion, ĉar ili estas iu erara mondo. La batalo kontraŭ la religio do estas rekta batalo kontraŭ tiu mondo, de kiu la religio estas la spirita aromo. La religia mizero estas parte la reprezenta trajto de la reala mizero kaj parte la protesto kontraŭ la reala mizero. La religio estas la ĝemo de la subpremata estulo, ĝi estas la opio de la popolo". Marks do ĉi tie konsilas batali kontraŭ la religio, sed en tiu tempo la juna Marks ne ŝajnas tute certa pri la rolo kaj funkcio de la religio; en la sama tempo li esprimis sin negative, sed ankaŭ pozitive. En la ĵus menciita verko li ankaŭ skribis: "La religio per si mem sen enhavo ne vivas per la ĉielo, sed per la tero kaj kun la malapero de la erara realo, de kiu ĝi estas la teorio, ĝi forfalas per si mem". Tio estas juĝo de negativeco pri la religio. Verŝajne pro kompato pri la unuaj viktimoj de la angla industri-kapitalismo, la amasproletaro, Marks volis vidi la pozitivan flankon de la religio. En la sama jaro 1843 li skribis: "Post la konkero de la potenco de la burĝaro la religio estu konservata por la popolo, pro du kialoj, kiuj intime estas

interrilataj. La senkompata, nebridata kapitalismo detruas por la amasoj ĉiom da feliĉo. Ĝi disrompas la familion, ĝi rabas el la laboro ĉian enhavon, ĝi malaltigas la laborenspezojn ĝis la ekzistimumo. Se laŭ la plej bonaj el la burĝa klaso al tiuj amasoj oni ne povas doni pli bonan sorton en la komenco de la 19-a jarcento kaj se oni krome forprenas de ili ankaŭ la konsolon de la postmorta mondo, la esperon pri rekompenco en ĉielaj regionoj, kaj de ŝiras de ili la opion de la religio, kiu estas la feliĉsuko por alie neelsuferebla doĉoro, tiam tio estas malhoma ago”.

Ankaŭ en 1849, en *La Germana Ideologio* Marks komencis koncepti la histori-materiismon, kiun li pli precize formulis en 1859. La ĉefa ideo de tiu histori-koncepto estas, ke la homo per sia spirito kaj imagpovo kreas mondon de pensoj, ideoj kaj imagoj, kiuj spegulas materiajn, sociajn spertojn kaj rilatojn, li transmetas la teran realon en alia imagita spirita mondo. „Religia mizero estas samtempe esprimo de reala mizero kaj protesto kontraŭ reala mizero”. Alivorte: la tirano en la ĉielo estas vere la tirano surtere. Tiam imagon havis laŭ Marks la mizeraj, elsuĉataj kaj subpremataj proletoj pri sia mastro. Jena koncepto pri religiaj imagoj de Marks ŝajnas al ni tre unuflanka.

Feliĉa homo, malgraŭ sunpremado kaj materia mizero, povas havi pli mildan imagon pri ĉielo kaj dio. La germana poeto Schiller, ekzemple, kies socia kaj materia vivo ne estas sen subpremado kaj materia doloro havis jenan imagon: En la blua ĉieitendo loĝas kara patro.

Ni en ĉi tiu artikolo klopodas pruvi, ke la problemo de la religio estas pli komplikita ol oni en la tempo de Marks kaj Engels kredis. Tiutempe sciencistoj kaj filozofoj kredis, ke ili povas malaperigi la religion, elementon post elemento, kaj ni jam aŭdis, ke Marks havis la saman optimismon: ĝi per si mem senenhava falos per si mem. Eblas, ke tiutempe Marks renkontis burĝajn liberpensulojn, kiuj per propagando de ateismo, kiun Marks neniam anis, volis sanigi la homaron de trompa religio. Lenin ankaŭ trovis tiajn pensulojn sur sia vojo. Li pretis akcepti ilin en siaj vicoj kiel batalantoj por pli racia mondo, sed avertis ilin

jene: „Se formiĝas unuecfronto de laboristoj, ni devas eviti ĉion, kiu povus damaĝi tiun fronton. Ni ne estas kuracistoj de la religio, sed ni estas kuracistoj de la socio”.

Materio kaj Spirito

Ni nun iom pli proksime rigardu la formuladon de la marka histori-materiismo de 1859. Marks dividas la socion en bazo kaj supro, la tuto de la produktrilatoj formas la materian, ekonomian substrukturon, la realan bazon, sur kiu leviĝas jura kaj politika superstrukturo, al kiu konformas difinitaj konsciformoj. La socia ekzisto de la homoj difinas ilian konscion. Kun la aliĝo de la ekonomia bazo la tuta, giganta superstrukturo transformiĝas, pli aŭ malpli rapide. Ni notu ĉi tie, ke Marks estas iom singarda, uzante la vorton ”malrapide”, kvazaŭ li sentis, ke la homa spirito emas al certa inerto.

La leganton ni atentigu pri la priskribo de Marks de la superstrukturo, unue juro kaj politiko kaj poste la tuta giganta superstrukturo, kvazaŭ Marks volus atentigi, ke la homa spirito estas multe pli riĉa ol ideoj de juro kaj politiko. Jam en 1849, en sia *Germana Ideologio* li menciis aliajn posedaĵojn de la homa spirito: moralo, religio, metafiziko kaj ni povas aldoni: arto, scienco, filozofio. La supra formulado pri la socia kaj spirita procezo de la homo estas nur tre elementa, eĉ tre kruda skizo. Marks nur atentigas nin pri juro kaj politiko kaj klare ni povas vidi, ke ĉiu socio, bazita sur certaj ekonomiaj rilatoj kaj kondiĉoj estas regata kaj protektata de certaj konceptoj de juro kaj de certa politika sistemo. Kiam la reala, praktika socia vivo elvokas ŝanĝon de tradiciaj kutimoj kaj fine tiuj novaj kutimoj iĝas praktike rajtoj, la sociaj rilatoj ŝanĝiĝas kaj kun tio la ideoj kaj konceptoj pri juro kaj fine trovas sankcion per novaj leĝoj kaj politika agnosko de la koncerna klaso, ofte per revolucio. Sed tia procezo povas daŭri longe, daŭris longe antaŭ ol la burĝoj de Francio akiris juran kaj politikan agnoskon, ĉar jam jarcentojn antaŭe ekzistis burĝa ekonomio, burĝaj kutimoj, burĝa filozofio, burĝa vivmaniero. Marks

mem skizis tiun procezon en parolado en Kolonjo en 1848: "Kaj la leĝo? La socio ne bazas sin sur la leĝo. Tio estas jura imagoj. La leĝo devas bazi sin pli sur la socio. La Kodo Napoleona ne produktis la modernan burĝan socion. La burĝa socio, kiu estiĝis en la 18-a jarcento kaj plu evoluis dum la 19-a jarcento, trovas en la Kodo nur leĝan esprimon. Tuj kiam ĝi ne plu konformos al la sociaj rilatoj, ĝi estos nur bulo da papero".

La entuta formulado de la histori-materiismo supre citita havis du gravajn efikojn. Unue Marks devigis la historiistojn rigardi la homan historion en alia direkto kaj memorigi ilin, ke la homo ne ŝvebas spirite en altaj nekontrolataj sferoj, sed staras kaj iras per siaj du piedoj sur la firma tero, ke la bazo de la homa vivo estas materia. La dua efiko estis, ke bedaŭrinde multaj distilis el la marksaj teorioj, ke la homo estas nur iu senvola ludilo de soci-ekonomiaj fortoj kaj cirkonstancoj, ke la homo ne havas ideojn kaj volon de si mem, ke la homo nur estas instrumento kaj viktimo de la historio, ke la homa spirito estas tute pasiva. Aliloke Marks skribis: "La historio faras nenion. Estas la homo, la reala kaj vivanta homo, kiu faras ĉion. La homoj fabrikas sub certaj difinitaj produktrilatoj tolon, drapon kaj silkajn ŝtofojn, sed la specialaj, sociaj rilatoj estas ankaŭ produktoj de la homo, same kiel tolo kaj drapo". Tion skribis Marks en 1847. Aliloke li klare skribis: "La cirkonstancoj formas la homon, sed la homo ankaŭ formas la cirkonstancojn".

Marks mem kontribuis tamen multe al la formado de la falsa bildo de la pasiva homo kun pasiva spirito. Pro lia vortuzado, terminuzado oni povus kulpigi lin, ke li rigardis la homan spiriton kiel foto-aparaton, kiu perfekte kaj meĥanike registras la mondon ekster ni. Cele priskribi la rilatojn inter la materia kaj la spirita procezo en la homo li skribis, ke la homa spirito estas eĥo de la realo, ke ĝi reflektas la realon, ke nia spirito efikas kiel spegulo. En sia verko *La Germana Ideologio* li skribis: "Eĉ la nebulaj imagoj en la cerbo de la homo estas necese sublimaĵoj de lia materia, fakta, observebla materie antaŭ kondiĉita vivoprocezo". Tamen oni ne rajtas

nomi Marks materiista filozofa. Jam antaŭ la apero de la Germana Ideologio en 1849 Marks faris kelkajn notaĵojn rilate la filozofion de Feuerbaf en 1845: „La manko de ĉia materiismo ĝis nun estas, ke oni komprenas la objekton, la realon, la sensan mondon nur sub la formo de la objekto aŭ de la observado, ne kiel homa, sensa aktiveco, ne subjektive".

Dank'al la nuna psikologio ni nun scias, ke inter la percepto per la sensoj kaj la formado de pensbildo, imagoj kaj konceptoj okazas komplikita kaj mistera procezo sen eĥo aŭ reflektanta spegulo.

Konscio kaj Subkonscio

La intimaj rilatoj inter la socio, juro kaj politiko estas facile videblaj kaj ni povus aldoni ankaŭ sciencon kaj moralon. Sed en la pli abstraktaj elementoj de la homa spirito: filozofio, religio kaj arto la rilatoj ne estas tiel klare videblaj, ĉar tiu aktiveco de la spirito emas difini, priskribi, pripensi kaj formuli le rezultojn pri aferoj, kiuj superas la ordinaran homon, la praktikan vivrealon, aferoj, kiuj leviĝas kaj ŝvebas super kiu ajna socio. Kaj ne nur ni celas la metafizikan duon, religio kaj filozofio, sed ankaŭ la arton. Arto estas pli intime ŝnurita al la socio ol la du aliaj, sed ekzistas arto, kiu ne rilatas al speciala socio aŭ ekonomia sistemo, sed kiu apelas al la elementoj ĝeneralhomaj, kiu tuŝas sentojn, pensojn, konceptojn komunajn al la tuta homaro. Kun la malapero de iu socio, ekzemple de la antikva kaj mez-epoka socio, ne malaperas ilia tuta arto, religio aŭ filozofio. Marksanoj provas klarigi la ankoraŭn ekziston de Shakespeare aŭ de la grekaj tragedioj. Plej obstina rilate malaperon estas certe la religio. Ĝi do posedas elementojn, kiuj superas skuojn kaj evoluon de la sociaj rilatoj. La optimismo pri la malapero de la religio, precipe en la sinnomantaj socialistaj landoj, montriĝis erara. Oni subtaksis la emon de la homa spirito resti kelkfoje en pensregionoj super spaco kaj tempo, oni subtaksis la ludemon kaj fantazieron de la homa spirito, oni subtaksis la liberamon de la homa spirito, esti sendependa kaj libera de socio bazita sur

homa havemo kaj egoismo. En la tempo de Marks oni ne sciis multe pri soci-psikologio, Marks mem daŭre uzas la vorton "konscio", dum ni scias nun, ke la procezo en formado de ideoj kaj konceptoj okazas pli subkonscie, kaj pri la subkonscio Marks jam ricevis averton de Spinoza, kiu jam, kvankam tre koncize, priskribis la subkonscion: "La homoj havas la iluzion esti liberaj, ĉar ili ne konas la kaŭzojn de siaj deziroj". Jen la subkonscio en nuktelo.

Tamen Marks kaj Engels dediĉis sian tutan vivon al edukado de la konscio de la homoj. Jam en majo 1843 Marks skribis: "Nia devizo do estos la reformado de la konscienco, ne per dogmoj, sed per analizo de la mistika konscio, kiu estas per si mem malluma, ĉu ĝi manifestas sin en religio aŭ en politiko". Se li akceptis la substrukturen de la socio kiel devigan kaŭzon de la homa ago, li ankaŭ vidis image la konscian homon kun la volo ŝanĝi certan situacion kaj cirkonstancojn.

Engels iam avertis rilate la formadon de sociaj teorioj, li avertis pri la subkonscia emo fasoni la realon laŭ la konceptita teorio kaj nei kaj malagnoski, retrudi faktojn, kiuj obstine rifuzas lasi sin envicigi en la teoria kadro. Li esprimis sin pri tio jene: "La objekto regu la penson kaj ne la penso la objekton". La koncepto estu kiel eble plej vasta kaj agnosku kiel eble plej da faktoj kaj fenomenoj. La rezulto estos pro la densa komplikiteco de la socia realo, ke ĉiu teorio povas nur enkadrigi parton de la vero. Engels en siaj lastaj jaroj iom forlasis la striktan kaj severan histori-materiismon kaj komencis atenti spiritajn faktorojn: tradicioj, popolo, raso, — kaj influon de la klimato al socia evoluo. Kaj eble jam Marks estis iom kun certa miro trafata de la fakto, ke li, diligenta leganto de Shakespeare, devis konstati, ke Shakespeare post la malapero de la socio de la Elizabeta Anglio ankoraŭ nun donas valoran saĝon, kaj por citi pli trafan ekzemplon, ke la grekaj tragedioj transvivis sian antikvan mondon kaj povas emocie skui homojn en ĉiuj landoj. Marks mem nomis ilin alta, sekvinda ekzemplo de arto. Vera sciencisto fakte devus daŭre modifi sian iaman teorion kaj pro tio la filozofio de la aŭstra naturfilozofo Ernst Maĥ

ankoraŭ nun valoras, kiu avertis, ke la naturleĝoj formulitaj de la homo estas nur la rezulto de homa cerbo kaj povus esti misrilataj al la reala naturo ekster ni.

Pri la problemo: Religio kaj Kapitalismo ekzistas diversaj verkoj, el kiuj ni volas citi du. Unue: *Religio kaj la Leviĝo de la Kapitalismo* de la angla profesoro Tawney (taŭni) kaj *La Protestanta Etiko kaj la Spirito de la Kapitalismo* de la marksana historiisto Maks Weber.

Oni atendas, ke la verko de la marksana historiisto estas pli realista, sed laŭ ni tia estas la verko de la angla profesoro, kiu anas nenian specialan historiismon. Li nur ĉerpas kaj distilas siajn teoriojn el malnovaj dokumentoj kaj laŭ rigardo al la homa naturo. Li komparas la homon kun lupoj kaj saĝe li provas konvinki: "La lupoj ankoraŭ estas sama kia ĝi estis ĉasata de Nimrodo. Sed dum la homo naskiĝis kun multaj karakterizaj trajtoj de lupoj, la homo estas hejmkutimigita lupoj". Per tiu koncepto profesoro Tawney provas klarigi la ekonomian malsaton, kiu fine detruis stabilan socion kaj kiel Marks li metas la homon en la centron kiel ekonomian aktivulon kaj ne la tiranecon de la cirkonstancoj.

Marteno Luter

Se iuj kredas, ke la nova kapitalista monsocio akiris pravigon kaj aprobon de Luter, ni tuj povas elrevigi ilin per unu diro lia: "La rento estas invento de la diablo". Luter estis monaĥo kaj mistikulo, sed tio ne signifas, ke li estis blinda por la naŭzaj kapitalistaj praktikoj, precipe ne por tiuj de la eklezio. Tiuj vekis lian koleron kaj indignon. Luter ĝuste vivis kaj agis en la tempo, kiam Hispanio ĵetis sian oron kaj arĝenton el Sud-Ameriko sur la merkaton, kio kaŭzis altan prezaltiĝon. Leviĝis furiozaj ŝtormoj de protestoj en la urboj kontraŭ monopolistoj, kiuj finance eltordis ilin. Luter predikis kaj verkis pamfletojn kontraŭ tiuj eldevigoj de mono, inter aliaj li skribis: "Estas tempo por ŝnuri la buŝon de la Fuger-familio". La

Fuger-familio estis minejposedantoj kaj grandkomercistoj de Sud-Germanio. Kalvin verkis broŝuron pri uzuro kaj ankaŭ predikis kontraŭ ĝi. Ne mirige, ke la ribelantaj kamparanoj apogis sin sur la Biblio, la Evangelio por pravigi sian ribelon. Terposedantoj, nobeloj devigis la kamparanojn produkti pli laŭ la sama prezo aŭ rekompenco por ke ili povu pagi la novajn, altajn prezojn. Jam antaŭ 1525, la jaro de la granda ribelo, en 1476 okazis ribeloj kaj depost tiu jaro ĉiun dekan jaron. Per sia traduko de la Biblio Luter donis armilon en la manojn de la kamparanoj. Sed la agado de Luter estis duoblekora.

Por li la vivo de la kamparano estis la plej feliĉa, la plej idilia, la plej ideala vivo. Sed kiam montriĝis, ke la germanaj kamparanoj en la nova monsocio, severe elŝucataj de siaj mastroj, havis alian opinion ol tiun de la mistikula Luter, kaj kiam ili pro tio minacis renversi la socian ordon per verŝado de sango, li turnis sin kontraŭ ili. Tiam Luter iĝis aliancano de ĉiu, kiu volis konservi la socian hierarĥion: burĝoj, nobeloj, princoj, pastroj. Luter perfidis la popoloelementon kaj estiĝis iu monstra ligo inter Luter kaj la papo kontraŭ la kamparanoj. Luter nun kunlaboris kun ekzemple Filipo von Hessen, kruea monstro, kiu ordonis mortigi la kamparanojn kiel brutaron. Li eĉ instigis la regantojn al amasmurdo. "Mi konsilas bati, bastoni, strangoli aŭ mortpiki ilin, belega tempo nun por princoj por meriti la ĉielon per sanga mortigo, pli bone ol per preĝo". Luter do prenis la flankon de la oficiala aŭtoritato kaj per tiu decido li stampis la postan Luteranisman per karakterizaj trajtoj de servemo kaj obeemo al eksterekleziaj regantoj, al la ŝtato kaj la registaroj. Luter estis mikso de religia radikalismo, li nomis kardinalojn kaj pastrojn venenistoj de la mondo, kaj de socia konservativismo. Li estus estinta tute kontenta, se la socio estus povinta returniĝi al la trankvilaj, stabilaj rilatoj de la Mez-Epokoj.

La subteno de princaj regantoj kaj ŝtatestroj al la Reformacio havis multe malpli da rilatoj kun idealismo ol kun materiismo, per transiro al la nova religio, la Protestantismo, ili povis konfiski la riĉajn posedojn de la Rom-Katolika Eklezio kaj enspezi kaj ĝui la fruktojn de la

monaĥejoj. La princo aŭ regionestro rajtis proklami la protestantismon por sia ŝtato, lando aŭ regiono kaj simple li komandis la loĝantan sekvi lin kaj anĉi la novan religion. Alia profitdona afero estis, ke oni ne plu estis devigita pagi tributon al Romo por la monstraj kostoj de la konstruado de la Petro-Katedralo.

Diversaj historiistoj nomas la Reformacion la venko de la komerca spirito super la tradicia etiko de la kristanismo kaj Kalvin oni kelkfoje kulpigis, ke li estis la unua teologo, kiu etike pravigis la eltordon de mono. Sed kapitalismo kaj komerco jam ekzistis grandskale en mez-epoka Italio kaj mez-epoka Flandrio. Katolikaj ŝtatoj, Hispanio kaj Portugalio, fondis ekonomiajn imperiojn. Katolikaj ĉerfurboj estis la komercurboj de Eŭropo kaj katolikaj bankistoj estis gvidantaj financistoj. Alia riproĉo al la Reformacio estis, ke ĝi inaŭguris epokon de senskrupula komerco kaj de morala elasto. La Reformacio certe liberigis aktivajn sociajn kaj ekonomiajn fortojn, kiuj ŝanĝis tradiciajn religiajn konceptojn. Sed tio okazis neplanite kaj kontraŭ la volo de la reformistoj. La monsocio kaŭzis neeviteblan evoluon ekonomian, socian kaj politikan. En la fruaj Mez-Epokoj kapitalo estis kroma helpanto al manlaboranta etmastro aŭ al etkamparano. Sed dum la 15-a jarcento en Germanio kaj jam pli frue en Italio la mono ĉesis esti servisto, ĝi leviĝis al mastro kaj Luter malamis la novan dion. Pri elasta socia moralo li eksplodis kiel vulkano, li koleris kontraŭ la elsuĉaj metodoj de la eklezio por kolekti la pagendan tributon al Romo, la moderna Babilono; li naŭzigis pro la ekspluatado de kamparano kaj etmastro fare de malicaj praktikoj de kapitalistoj. Sed malgraŭ sia naŭva kaj mistika vizio li ne perdis okulon por la ekonomia praktiko. Li vidis la progresigan flankon de monprunto por la kamparano, sed ne laŭ tro alta rento, 4% aŭ 5%. Tio devigis la kamparanon produkti pli kaj eĉ produkti pli bonan kvaliton por sukcese konkurenci en la merkato kaj per profitoj pagi la renton kaj repagi la pruntitan sumon. Komercon Luter ankaŭ aprobis, sed nur rilate aferojn strikte necesajn. La vendanto ne postulu pli ol kompenso por sia laboro. Kiel pensanto laŭ mez-apokaj tradicioj li konvinki-

ĝis, ke servuteco estas la necesa fundo por la socio. Provoj de abolo alarmis lin, en politika teorio li ekzalte defendis la absolutismon de eksterekleziaj aŭtoritatuloj. La postulo de vilaĝanoj fini servutecon per la argumento, ke "Kristo savis kaj liberigis nin ĉiujn, la humilajn kaj la altajn, senescepte, verŝante sian kostan sangon" estis por Luter anarkio. Li ne povis imagi socion kun egalo, iuj devas esti mastroj, iuj sklavo, iuj devas esti regantoj, iuj regatoj. Li daŭre citis Paŭlon, kiu diris: "Antaŭ Kristo mastro kaj sklavo estas unu".

Luter defendis socian hierarkion, sed koleris kontraŭ la arogo de pastroj, kiuj volas etike kontroli kaj reguligi ĉion. "Dio parolas rekte al la animo, ne pere de la pastroj". En tiu liberiĝo de pastra arogo Johana d'Ark jam anticipis lin. Luter spirite vivis en socio, kiu ne levis sin super tiu de etkampanoj kaj etburĝoj, mez-epoka socio. En 1524 post la religia batalo Luter komencis pensi pri ekonomio; la monopolo de la sudgermanaj komercistoj incitis lin. En 1540 li konsilis prediki kontraŭ uzuro. Luter volis, ke la registaroj agu kontraŭ tro altaj profitoj, sed tio ne estis realigebla en la dishakita Germanio. La komerco en la nordo kaj la frukapitalismo en la sudo havis intimajn rilatojn kun Italio, Hispanio, Portugalio kaj la Nederlando. La Fugerfamilio komerce kaj finance rilatis intime kun la papa kortego, ĝi estis profunde miksitaj en la komerco pri la pardonleteroj, Fuger havis konstantan reprezentanton en Romo.

Luter konsideris la Reformacion movado por germana naciismo, li eble estis la unua germana naciisto. Li atendis helpon de la imperiestro kontraŭ la influo de fremda, romana potenco, sed la imperiestro estis ŝnurita en la arĝentaj katenoj de Fuger. En 1523 Luter defiis Fuger kaj la imperiestron por liberigi sin, sed la mono estis pli forta.

Alia timo de Luter estis, ke la simpla germana animo dronos en mono, uzuro kaj lukso. "Dio donis al ni sufiĉe da lino, lano kaj tolo por decaj, honestaj vestoj". Luter ne nur protestis religie, sed ankaŭ sociekonomie.

Li vidis eilandigi la valorajn metalojn, precipe pere de la komerccentro Frankfurto. Li pensis grandgermane; por li Germanio estas unu tuto vivanta. "Dio ĵetis nin, germanojn, tien por puŝi nian oron kaj arĝenton en fremdajn landojn, riĉigi la tutan mondon kaj mem resti almozuloj, Anglion per drapo kaj Portugalion per spicoj. En Frankfurto Germanio estas prirabata je oro kaj arĝento, Frankfurto estas ortruo kaj arĝentruo".

La plendo de Luter montris, ke li vidis nur unu flankon de la nova kapitalista realo, ke li ne vidis aŭ ne volis vidi, ke per kapitalismo Germanio ankaŭ povos progresi. Lia plendo pri altiĝo de prezoj pravis. Hispanio importis arĝenton el Meksikio kaj oron el Peruo, kio sentigis sin poste en Germanio. Sed ĉe la fino de la Mez-Epokoj la grandkapitalo havis benan influon por Germanio, ĝi produktigis la arĝentminejojn de Germanio tiom, ke en 1545 ili produktis pli ol tiuj de aliaj landoj. Tiam Germanio riĉiĝis per kulturtrezoroj. Ne nur la nomo de Fuger sonis tra Eŭropo, sed ankaŭ tiuj de Dürer, Viŝer kaj Grunevald. Materian floradon sekvis kultura florado. Fremdaj komercistoj ne plu povis elsuĉi Germanion de valoraj metaloj, ili restis en cirkulado de la lando. Entute Luter povus esti rigardata kiel funebranto pri la morto de la Mez-Epokoj, ne kiel heroldo de nova tempo.

Johano Kalvin

Multaj luteranoj eble neniam legis la averton de Kristo: "Ni ne venis por alporti la pacon, sed la glavon". Kalvin, ĝenerale diligenta leganto de la Malnova Testamento, certe legis tiujn specialajn vortojn de Kristo. Kontraŭe al la Luterismo la Kalvinismo estis aktiva kaj radikala.

Ĝi strebis al renovigo de la socia realo per religia etiko. Ĝi realiste akceptis certan modernan socian kaj ekonomian realon kaj interpretis ĝin per sia religia etiko, ne volante ŝanĝi la bazon. La kalvinistoj kristikis kaj malaprobis ekonomiajn misuzojn, kiujn ili nomis "devioj de natura stato de la aferoj" — ili esprimis sin kontraŭ profiteco, havemo, akra konkurenco, ekspansio de kapitalo,

necesita riĉiĝo, kiuj minacis la stabilecon de la ekzistanta ordo kaj por ili tiu ordo estis tiu de etkomerca ekonomio, ekzisto de etkmparanoj kaj de etfakulaj manlaborantoj en modesta merkaturbo, kie la industrio laboris kaj produktis nur por la subtenado de la ordinara mastrumado, en kiu la produktado de riĉo kaj de surpluso tuj estis sekvata de la konsumado aŭ de praktika uzado. Malsame al Luter, kiu superlaŭdis la pastoralan kamparanan vivon, kiu pro kapitalista evoluo pli kaj pli estis detruata, la kalvinistoj rigardis realiste kaj praktike la ekonomian evoluon kiel ion neeviteblan, kion oni ne plu povis returni. Ili ne reve idealigis la virtojn de la agrikultura vivo, nek rigardis suspekteme la mondon de kapitalista entrepreno kaj financado. Kelkaj kiel Zwingli okupis lokon inter Luter kaj Kalvin. Ili daŭre ripetis, ke privata posedo originas de peko kaj ili avertis la riĉulojn, ke ili ne eniros la regnon de la ĉielo, ili kondamnis renton kiel aferon kontraŭ la leĝo de dio. Kalvin ne restis ĉe la fonto de la rivero, sed boatis distancon kun la fluo. Kiel la frua Kristanismo kaj la moderna socialismo la kalvinismo estis grandparte urba movado. Ĝiaj propagandistoj estis grandparte migrantaj komercistoj kaj manfakuloj. Ĝi predikis al klasoj de komerco kaj de industrio, do trovis fekundajn grundojn en Antverpeno, Londono kaj Amsterdamo. Ĝi akceptis realiste la neceson de kapitalo, kredito, bankado kaj financado. Ili renversis la tradician koncepton "kio estas ekster la neceso estas malaprobinda" kaj "la komercisto estas parazito, uzuristo kaj ŝtelisto". Kalvin skribis: "Kial enspezoj de komerco ne povas esti pli larĝaj ol tiuj de terposedo? Ĉu la profitoj de komerco ne venas de diligento kaj de laboremo? La Kalvinismo havis striktajn regulojn, sed ne plu malaprobis ekonomiajn motivojn, ne plu rigardis kapitaliston kiel iun, kiu riĉigas sin koste de siaj najbaroj nek rigardis plu malriĉon kiel meriton; la Kalvinismo estis la unua religio, kiu agnoskis kaj aplaudis ekonomiajn virtojn. Ĝia malamiko ne estas akumuligo de riĉoj, sed la misuzado de riĉo kaj mono, ĝi akre kritikis uzadon de mono por ekstera pompo kaj por individua vanto. Ĝia idealo estis socio, kiu strebas al prospero kun

la sobra, sincera koncepto de viroj, kiuj disciplinas proprajn karakterojn per pacienca laboro kaj kiuj dediĉas sin al servo akceptinda de dio. La entuta reganta ideo de la Kalvinismo estis: la laboro estu honora al dio.

Rento estas laŭleĝa, sed ne tro alta, oni eĉ pruntedonu monon al malriĉuloj sen rento, la pruntoprenanto rikoltu la samajn avantaĝojn kiel la pruntodonanto. Kredito estas normala afero kaj neevitebla incidento en la vivo de la socio, sed neniu rajtas kapti ekonomian gajnon malavantaĝe al sia najbaro. Kalvin abolis la vortojn de la patroj en la Malnova Testamento, ili iam valore efikis en sociaj kondiĉoj, kiuj ne plu ekzistas. La financisto ne plu estu pario, sed utila membro de la socio. Kalvin fakte pere de kristanaj tradicioj, honesto kaj justo, apelas al la komerca prudento. Laŭ tiu vidpunkto ĉiu kristano evitu eltordon de mono.

Ni vidas, ke la Kalvinismo aprobis aktivecon, kiu estis karakteriza por la estonto. "La kalvinistoj devis uzi la oportunaĵojn, kiujn la nova realo ofertis kaj koncentri sin sur la nova tasko por la gloro de dio!!

Kalvin skribis plue; "Dio ne nur antaŭvidis la falon de la unua homo, sed ordigis ĉion per la decido de sia volo". Ĉi tie ni atingis kaj devas tuŝi iun multdiskutitan doktrinon el la Kalvinismo, la solvo, kiun la Kalvinismo ofertas rilate la problemon de la libero de la homa volo. Ĉu la homo libere decidas aŭ ĉu iu objektiva potenco, dio, regas kaj igas lin voli. Por Kalvin la doktrino de la antaŭdestino estis la solvo. El la multaj dioj, kiujn la homa imago kreis, la dio de Kalvin estas la plej frostkora, la plej maljusta kaj la plej kruela iam kreita. Laŭ Kalvin dio decidis mistere, nesondeble kaj nekomprenible por la homo, Dio decidas al beno aŭ malbeno tute sen konsideroj pri virta aŭ malvirta vivo de la homo, tute ne atentante meritojn aŭ mankojn. Kaj neniu povas kritiki aŭ ŝanĝi tiun decidon. Do la kalvinisto, kiu obeis la leĝojn de la Kalvinismo kaj vivis diligente, ŝpareme, simple kiel etindustriisto, aŭ la kalvinisto, kiu estis nobla financisto kaj ne postulis renton de ano en mizero, pro tiuj kapricaj inklinoj de sia dio povus kruele fali en la abismon de malbeno kaj lia vivo konsidere al la atendita

beno kaj sankteco povus esti tute vana, kaj tiaj anoj, kiuj deviis de la striktaj reguloj de la kalvinista etiko, povus gajni la eternan vivon. Tia decido laŭ Kalvin estas tute justa kaj fina. Multaj kalvinistoj ne povis digesti tiom kruelan dion kaj poste Kalvin aldonis la eblan ŝancon akiri tamen gracon en la okuloj de dio, sed principe la doktrino restis sama.

La dio de Kalvin memorigas nin pri alia blinda dio, nome la dio de Darvin, de li nomita la natura selekto. La naturo destinas la pluvivadon de certaj tipoj de iu speco kaj favoras ilin per pli fortikaj organoj, per kiuj ili iĝas pli rapidaj aŭ pli fortaj. Rigardante la rezulton de tiu selektado oni konstatas, ke ankaŭ la decidoj de la dio, la naturo, estas nekomprenablaj, ke ankaŭ la naturo estas tute blinda dio ne estas spegulbildo de la kruela, ankaŭ povus diveni, ĉu la ideo de Kalvin de tia blinda dio ne estas spegulbilfo de la kruela, maljusta naturo. Ambaŭ, la naturo kaj la dio de Kalvin, selektis iun eliton, almenaŭ tion kredis Kalvin. Li klarigis plu al siaj anoj, ke la liberiĝo de la homo ne estas laboro de li mem, sed de iu objektiva potenco. La diligenta, disciplinita etsociana kalvinisto estas nur humila, modesta instrumento por krei kristanan socion, sankciitan de dio; la kalvinisto ĉiam konsciu, ke li ĉiam vivas kaj laboras sub la garda okulo de la granda Taskmastro.

La unua konkludo pri la severa doktrino de la antaŭdestino povus esti, ke ĝi nepre kondukus al iu fatalismo, se ĉio jam estas aranĝita kaj decidita antaŭe kial oni tamen estu diligenta, ŝparema kaj virta?

Sed la predikistoj de la Kalvinismo ne propagandis fatalismon, krome psikologie la efiko estis tute mala. La antaŭdestino ne kaŭzis senvolecon, ne mortigis la kredon en la estonto kaj ne sufokis la fanatikan agemon de la anoj. Ili komencis kredi, ke per diligento, per simpla vivo, per apliko de sociaj virtoj certe trovos favoron en la okuloj de dio, ĉe la granda amaso de la anoj vekigis la kredo, ke ili estas elektita popolo, destinita por la detruo de Romo, la moderna Babilono. Ili formis kune iun kolektivajn diktatoron, al kiu ĉiu oferis proprajn individuajn dezirojn por la interesoj

de la komunumo, al kiu ĉiu nuligis propran volon por la fina venko de la tuto. Ili formis sin al iu firmdecida popolo kun fera, ne ŝancebla volo, kiu ankaŭ kondukis al maltoleremo. Tiom forta volo ne povas ne konduki al maltoleremo, ne estas spirita spaco aŭ tempo por rigardi dekstren aŭ maldekstren. Kalvin fondis en Ĝenevo sistemon pli maltolereman, pli severan, pli kruelan ol la Rom-Katolika Eklezio iam aplikis, ĉar tiu ĉiam malfermis la pordon al graco kaj pardono de pekoj, sed Kalvin pardonis neniun. En Ĝenevo ĉiu eta devio de kredo aŭ de sociaj reguloj estis punata, armeo de spionoj kontrolis la tutan urbon kaj gvertis al tro pompaj vestoj, tro mallongaj jupeoj kaj kompreneble streĉis intense la orelojn. Libera gazetaro estis tute sufokita.

Kalvin povis en Ĝenevo strikte kaj senpardonone apliki sian sistemon kaj etikon kaj bremsi la forlogon al riĉigo kaj ekspansio de kapitalo, ĉar Ĝenevo kun siaj muroj estis limigita spaco; en tiu kadro ekonomia libero apenaŭ estis realigebla. Kaj tamen aperis krevo en tiu absoluta sistemo. La grandburĝaro de Ĝenevo ne kontraŭis la kontrolon de vestoj aŭ la devigon al religia instruado, sed rifuzis akcepti la riproĉon de "duobla uzuro". Ili estis devigitaj repagi pruntojn de mono laŭ preskribitaj kurzoj. Ili rezistis tiun striktan regulon, defendante sin per la argumento: Mono levigas kaj falas. Kaj Kalvin tiupunkte cedis. Se oni en Ĝenevo malfacile povis liberigi sin de la strikta ekonomiokorseto, en al resto de Eŭropo oni havis pli da ebloj kaj pli da spaco por cedi al ekonomiokorseto, en la resto de Eŭropo oni de Anglio kaj el la holandaj burĝoj formigis la unuajn riĉajn burĝarojn, patriciajn familiojn, kiuj arogis al si nobelan titolon kaj kiuj komencis aĉeti la posedaĵojn de mizeriĝintaj nobeloj aŭ konstruigi vilaojn kaj kastelojn de si mem. La neceso kaj la deziro fari profitojn kreis komencon de senkonsciencia senprincipa libera kapitalismo. Amsterdamo havis ĉirkaŭ 1650 44 presistojn, kiuj necese devis funkciigi sian aparaton kaj emis fari profitojn. Por tio ili pretis presigi kian ajn aferon, ĉu por la angla reĝo aŭ por la diktatoro Kromvel kaj ne estis iu Kalvin aŭ alia kalvinista diktatoro, kiu

povis malpermesi tion. Etikaj kaj religiaj konsideroj ne plu ekzistis.

Inter la puritanoj de Anglio kaj la kalvinistoj en la Holanda Respubliko formiĝis diversaj grupoj, kiuj klarigis la teoriojn de Kalvin propramane. Kiel ni jam aŭdis, ke la homo estas komparinda kun lupo, kun ekonomia lupo, armita per forta apetito, ni devas konstati, ke multaj kalvinistoj ne emis aŭ ne plu povis vivi laŭ la preskaŭ asketa idealo de Kalvin, ili agis laŭ la propraj vortoj de Kalvin "eluzi la oportunaĵojn de la nova realo". Formiĝis super la granda amaso de etsocianaj kalvinistoj grupoj de riĉaj komercistoj kaj financistoj, por kiuj la kalvinista etiko kaj moralo kaj la kredo je la antaŭdestino estis nur bremsaj katenoj. Ĉar ili ne nur havis financon, sed ankaŭ politikan kaj socian potencon, tute kontraŭ la originaj demokrataj ideoj de la kalvinistaj organizoj, kiuj kredis je la egalo de ĉiuj membroj antaŭ dio. Okazis sociaj kaj politikaj bataloj helpe de religiaj formuloj. En la Holanda Respubliko du predikistoj liveris la religian vualon, malantaŭ kiu kaŝas sin sociaj kaj politikaj konfliktoj. La vualo estis la doktrino de la antaŭdestino. Miriga estas la opinio de la angla historiisto Karlo Vilson, ke la konflikto estas nur religia konflikto interna en la eklezio, ke ĝi ne havis ian rilaton kun socia kaj politika realo. Li ne vidis, ke la predikisto, kiu defendis la originan puran koncepton de Kalvin pri la antaŭdestino, estis kredata de la amaso de etburĝaj, etsocianaj kalvinistoj, kiuj per tiu formulo esprimis sian deziron al demokrata egalo, al politikaj parolraĵoj en la regado, al la fondo de demokrata teokratio, regata de tiuj socianoj, kiuj por simpla kaj diligenta vivo estis antaŭdestinivaj de dio al regado honora al dio.

La alia predikisto klare esprimis la konceptojn de tiu kalvinista grupo, kiu plene deviis de la originaj asketaj idealoj de la Kalvinismo kaj laŭ la vortoj de Kalvin mem "eluzis la oportunaĵojn de la nova realo". Ili estis la familioj, kiuj riĉigis sin kaj kiuj per sia ekonomia potenco, la komerckapitalo, ankaŭ praktike posedis la politikan potencon. Por ili la ideo de antaŭdestino estis simila al la katenoj de la absoluta ŝtato, kontraŭ kiu ili

ĝuste batalis. Krome per sia socia potenco ili mem destinis tiom da aferoj, destinis per sia ekonomia agado fakte propran sorton, ke la potenca antaŭdestinanta dio de Kalvin tute malaperis el iliaj pensbildoj, dum etburĝaj kalvinistoj sentis sin en sia stato de dependeco de la komerca grandkapitalo religie kaj image dependaj de la antaŭdestinanta dio. La regantaj riĉulojn oni nomis la regantoj, kaj tiu vorto reganto vekis inter etburĝoj kaj popolo flamojn de malamo. En tiu ŝajne religia konflikto socia ĵaluzo kaj envio kontribuis al la fajreco de la batalo.

La reganta princo el la Oranĝo-familio vidis per partopreno en la konflikto ŝancon fortigisian politikan potencon kaj mem kredante nenion, li vicigis sin inter la kredantoj de la antaŭdestino. Ŝajne li simpatiis kun la etburĝoj kaj la griza proleta amaso, kiuj nun atendis de li la demokration kaj la teokraton. Sed tiuj ne venis, teorie la striktaj kalvinistoj venkis, sed la regantoj restis la regantoj, ekonomie kaj politike. Nur kelkaj libercredaj kalvinistoj estis persekutataj, mortigoj ne okazis, sed la unua ministro, la parolanto por la komercburĝaro, devis perdi la kapon post la verdikto de maljusta politika tribunalo. Tiel falis la plej sagaca cerbo de la Holanda Respubliko. La socia realo en tiu konflikto kompreneble estis pli komplikita ol tiu ĉi skizo povas priskribi, tute precizajn liniojn oni ne povas tiri. Estis regantoj, kiuj estis katolikaj, estis regantoj, kiuj ankoraŭ kredis je la antaŭdestino, estis diversaj etburĝoj, kiuj ankaŭ liberigis sin de tiu minaca potenco. Sed malgraŭ ĉio la toleremo, precipe favorata de la regantoj, venkis kaj Amsterdamo ne iĝis dua Genevo.

Malgraŭ la akcepto de nova kapitalista realo la Kalvinismo havas du aspektojn. Ĝi propagandis tendencon, kiun oni povus karakterizi kiel returniĝon al mez-epoka vivstilo: simpla vivo, sen lukso, sen pompo, ne riĉigo koste de la najbaroj, malalta rento, ne ekspansio de kapitalo. La kalvinistoj aplikis disciplinon pli severan kaj pli kruelan eĉ ol la Rom-Katolika Eklezio aplikis kaj postulis. Kalvin citis Paŭlon: "Se iu ne laboros, li ne manĝos". Almozpetado estis strikte malpermesata de Kalvin. Kalvinistaj predikistoj ludis la rolon de



*La pia grafo Filipo von Hessen,
la plej sangavida kamparanbuĉisto.*

la asketaj malnovaj profetoj. La eklezio en Ĝenevo returniĝis spirite kaj morale al la regno de Kristo. La asketismo de la unuaj kristanoj estis por Kalvin alta, sankta idealo. Etindustriistoj ne rajtis produkti super la strikta neceso.

Sed ekster tio, komparante Luter kun Kalvin, oni rajtas diri, ke Luter returnas sin tute al la Mez-Epokoj, al la pasinto, dum Kalvin klare rigardas al la estonto, al la moderna komerca kaj industria kapitalismo. Sed li ne antaŭvidis la estiĝon de financa oligarĥio kaj la koncentriĝon de granda kapitalo en malmultaj manoj. Per sia fondo de teokratio en Ĝenevo li donis danĝeran ekzemplon de religia tiraneco. Kiam poste anglaj puritanoj fuĝis al Nov-Anglio en Ameriko, por servi dion en honoro, ili trovis tie la saman, religian, maldemokratian, tiranecon, kaŝitan malantaŭ la masko de simpla, disciplinista, senluksa vivo, dediĉita al honora

servo al dio, sed sen la intelekta vido de Kalvin.

Ni jam memciis la verkon de la marksana historiisto Maks Veber: *La Protestanta Etiko kaj La Spirito de la Kapitalismo*. Veber klopodis pruvi, ke Calvinismo kaj Puritanismo kreis moralan kaj politikan etikon, favorajn al la venanta kresko de kapitalista entreprenemo. Laŭ li la novaj religioj kreis kapitalistan spiriton antaŭ la vera praktiko. Tio estas por marksano iom stranga teorio, ĉar laŭ la marksismo unue estiĝas kutimoj, kiuj poste iĝas rajtoj, kiuj poste akiras leĝan agnoskon.

Sed la ekonomiaj faktoj en Eŭropo tute renversas la teorion de Veber. Dum la Mez-Epokoj kun la oficiala, ĝenerala romkatolika kredo estis multe da kapitalista spirito. Venecio, Florenco, Sud-Germanio, Flandrio estis centroj de kapitalista industrio kaj de kapitalista financado. Katolikaj ŝtatoj kiel Hispanio kaj Portugalio fondis rabemajn imperiojn. Kiam la holandaj provincoj komencis la batalon kontraŭ Hispanio, 90% el la loĝantaro estis katolikaj kaj provizore tute ne emis ŝanĝi religion. Post la venko oni tamen kelkfoje nomis la Holandan Respublikon kalvinista aŭ protestanta ŝtato, dum la granda plimulto ankoraŭ estis katolika. Dum la posta evoluo kalvinistoj kaj luteranoj neniam atingis pli ol 33% el la loĝantaro. Anglion oni nomis protestanta ŝtato kun protestanta reĝino, sed multaj puritanoj fuĝis de sub tiu protestanta reĝimo, ĉar protestanta reĝino persekutis ilin. Homoj ne facile ŝanĝas religion kaj se ili faras tion, iliaj motivoj estas ĝenerale pli komplikataj ol Veber provas kredigi al ni kaj ofte havas nenian rilaton kun ŝanĝoj en ekonomio aŭ socio. Soci-materiaj ŝanĝoj komune fluas kun psikaj kaj moralaj ŝanĝoj; la lastaj estas ofte reago al la unuaj. Sociologoj notis, ke grava faktoro en ŝanĝo aŭ neŝanĝo de religio estas la konduto de la pastroj, predikistoj kaj pastoroj. Ni ne kredas, ke la amaso de la kredantoj, ĉu katolika, ĉu protestanta, enkorigas tiom profundajn, filozofajn konvinkojn pri sia kredo kaj certe ne pri ĝia mistika elemento. Aŭstrio montris, kiel konduto de pastroj povas efiki sur la konvinkojn kaj kiel oni facile povus transiri de unu religio al la alia kaj

ke la vera diferenco inter du religioj ne estas netranspontebla abismo. Ĉirkaŭ 1550 Aŭstrio grandparte iĝis protestanta kaj ĉirkaŭ 1650 returniĝis preskaŭ tute al la katolika kredo. Oni donas kiel klarigon, ke la katolikaj pastroj ne estis despotoj, sed humanaj, moralaj gvidantoj kaj helpantoj. Krome teologiaj problemoj neniam ŝajnis cerbumigi la aŭstrojn. En tiu procezo la habsburgaj reĝoj ludis gravan rolon.

Laŭ Marks kun la erara realo ankaŭ malaperos la religio. Montriĝis, ke kie laŭ marksana vidpunkto la erara realo malaperis, ekzemple en Sovet-Unio, la religio ne malaperis, ke ekzemple en Moskvo la patriarĥo, la ĉefo de la Grek-Ortodoksa Eklezio, estas multamata kaj multhonorata homo, kiu ricevas krom bonega ŝtatsalajro ankoraŭ multajn donacojn kaj donaĵojn de siaj religiemaj rusaj kredantoj.

La kapitalismo per sia ekspluatado kaj per sia scienco certe detruis multe de la religio; liberalaj burĝoj faris multe da propagando por la ateismo. Darwin per sia teorio de evolucio povis nur konkludigi, ke la homo devenas de besto kaj ne de dio, por multaj religianoj ne akceptebla kaj timiga tezo.

Sed la moderna kapitalista socio ankaŭ havas tute alian efikon. Por multaj homoj ĝi kreas ian ekziston kaj vivon sen belo, sen espero, sen okazo ŝvebi pense kaj image super spaco kaj tempo. Multaj klopodas trovi kompencon por tio en preĝejo kaj katedralo kaj provas dronigi sin en mondo de mistiko. Katolika preĝejo pli efike nutras tiun malsaton ol protestanta preĝejo sen ritoj, sen ornamoj, sen bildoj, sen altaro kaj aliaj servoj. En Anglio oni notis, ke la nombro da katolikoj daŭre kreskas, ili volas senti sin hejme en kvazaŭa insulo de mez-epoka mistiko meze de brua, senkora, egoista mondo sen komuna vivo.

Historia kono servas al kompreno de la nuno, se ne, ĝi estas senvalora. Ni konstatis dum nia modesta studo, ke socia ŝanĝo ne tuj vekas la deziron al nova ideologio, al nova religio. Ni trovis, ke ekzistis katolika kapitalismo antaŭ la kalvinista kapitalismo, la patro de la nuna, moderna kapitalismo. Ni rajtas diri, ke la nuna, moderna kapitalismo kiel politika, socia kaj ekonomia sistemo fuŝas nin morale ĝisfunde. La fruan kalvinismon oni rajtas nomi kapitalismo kun moralo, ĝi provis bridi profitejon kaj havemon. La moderna kapitalismo estas tute sen spirita valoro, ĝi ne havas religion, etikon, moralon, filozofion. La ekonomo angla, Keynes (kenz) skribis: "Moderna kapitalismo estas absolute senreligia, sen interna unuiĝo, sen multe da publika spirito, ofte, kvankam ne ĉiam, pure kongrio (1) de posedantoj kaj strebantoj al posedo".

Iom pli detale kaj pli poete Marks en la *Komunista Manifesto* priskribas la rolon de la kapitalismo pere de la burĝa klaso: "Kie ajn la burĝaro akiris la potencon, ĝi detruis ĉiujn feŭdajn, patriarĥajn kaj idiliajn rilatojn. Ĝi lasis inter homoj ne alian rilaton ol nur krudan egoismon kaj senkoran kontantpagon. Ĝi dronigis pian pasion, kavaliran entuziasmon kaj ĉiutagan sentimentalismon en la senvarmaj riveroj de egoista kalkulado. Anstataŭ la pene akiritaj liberecoj, ĝi realigis unu solan, senskrupulan liberon, — la libero de komerco. Unuvorte, ĝi anstataŭigis ekspluatadon vualitan en religiaj kaj politikaj iluzioj per ekspluatado malkaŝa, senhonta, rekta kaj bruta".

La moderna kapitalismo detruis multe en la religio, sed ĝi trudas momente multajn homojn al mistikaj atmosferoj, ĝi ne detruis la religion entute, nek ĝi detruis per sia imperiismo la mistikon de la naciismo.

S. Aarse

*) korupta klico.